Marista Ligo, kiu klopodas disvastigi Esperanton inter la maristaro.

Krom tio havis specialajn kunsidojn : kuracistoj, dentistoj, farmaciistoj, juristoj, komercistaj, ĵurnalistoj, framasonoj, liberpensuloj, socialistoj, studentoj de nova vivo kaj aliaj.

La Esperanto-Ĵurnalo organizis kunvenon, en kiu oni priparolis la nunan staton kaj la celojn de la esperantaj oficejoj, konsulejoj, k. t. p. Oni atingis ĝojigan decidon rilate al la organizo de la konsuloj.

Kompreneble ankaŭ la samnaciaj esperantistoj havis siajn apartajn kunvenojn.

## La Esperantaj Diservoj

Esperanto ne nur taŭgas por la ĉiutagaj bezonoj de la homoj, ne nur por la negocaj kaj sciençaj aferoj ; ĝi povas esprimi kaj komuniki la plej profundajn sentojn de la homa animo tiel bone, kiel ĉiu ajn nacia lingvo, Pruvo de tio estis la esperantaj diservoj, kiuj okazis dimanĉon, la 11'an de Aŭgusto. Matene en "Great St. Mary's" Preĝejo fariĝis la unua plena diservo en Esperanto laŭ la anglikana diservordo. En konsento kun la Ĉefepiskopo, la Episkopo de Ely permesis la diservon kaj aprobis la esperantan tradukon de la anglikana preĝlibro, bonege faritan de Pastro J. C. Rust. La preĝejo estis plenigita de ĉirkaŭ mil diversnaciaj esperantistoj, kiuj kantis kun religia entuziasmo la himnojn, kaj aŭskultis kun sindonema atento la predikon de Pastro Rust. Laŭ Epistolo al la Efesanoj (ĉapitro 1, 9) li parolis pri la nova ordo en la pleneco de tempoj, pri la unueco de ĉiuj nacioj, la unueco de la homa historio kaj la unueco de ĉiuj formoj kaj specoj de sciado.

La sama entuziasma pieco regis la kunvenintojn vespere en la Emanuel Kongregacia preĝejo, kie okazis katolika diservo. Pastro Richardson legis telegramon, senditan el Romo de Mgr. Giambine, kaj entenantan la papan benon de la Sankta Patro. Poste li predikis pri tiu tempo feliĉa, kiam la tuta homaro estos vere unu familio da gefratoj havante unu Patron kaj la saman religion ; unuvorte, kiam la tuta homaro nur estos unu ŝafaro sub unu paŝtisto (Ev. Joh. 10, 16). Tiun ĉi katolikan diservon beligis diversaj solaj kaj ĥoraj kantoj.

Dua anglikana diservo fariĝis ankaŭ dimanĉon vespere en la Emanuel Kongregacia preĝejo. Pastro Selbie parolis

Digitized by Google